# ENTOMOLOGIO

## Nova speco kaj nova gentonomo de formikoj.

« *Myrmicocrypta Emeryi* » n. sp. ☿ L. 2,0 ĝis 2,3 milim. Mandibloj kline triangulaj, brilaj, malglataj, kun kvin netaj dentoj. Klipeo laŭlarĝe presata, kun antaŭrando plena kaj malkava, kun postrando tre alta, eĝo simile arkita kaj daŭrigata flanke ĉe la flankeĝo de l'vango, kiu estas malalta kaj ne atingas la *postrandon* de l'okulo. Antenkavetaĵo mallonga; kapo ne presata inter anteneĝo kaj eĝo de l'vango. Anteneĝoj alproksimigataj, paralelaj, antaŭe mallarĝaj, pli proksimaj unu al la alia, ol al kaprando. Kapo kvadratforma kun postrando kava kaj flankoj apenaŭ malkavaj. Malkavaj okuloj kuŝas ĉe la antaŭa triono de l'kaprando.

Sulko estas tra la tuta longo de l'anteneĝoj, kiuj ne superas la altaĵon de l'okulo. Tiu sulko estas plilongigata poste per malprofunda mezsulko okcipita. Antenoj longaj; la skapo tiom superas la postan kaprandon kiom la sesono de sia longo. Ĉiuj artikoj de l'antenvipo pli longaj ol dikaj.

Promezonoto tre malkava. Pronoto kun netaj antaŭrando kaj postrando, kaj kun larĝa malprofunda laŭlarĝa elpreso en la mezo. La postrando en ĉiu flanko; antaŭe kun malakra dento kaj poste kun malgranda tubereto. Mezonoto diskforma, kun malprofunda laŭlonga mezosulko. La pera segmento formas borderon ĉirkaŭantan la mezonoton ĝis la postrando de l'pronoto. Brustkesta eltranĉo larĝa kaj multete profunda, kun du rostretoj ĉe la fundo. Fundsupraĵo de l'*metanoto* malalta, duoble pli longa ol larĝa, supre kun laŭlonga mezosulko, flanke kun du tuberetoj kaj poste kun du triangulaj dentoj. Deklivsupraĵo tre mallonga. Unua tubero de l'pedunklo tre mallonga, pli larĝa ol longa aŭ *tiom* larĝa kiom longa, kun laŭlonga mezosulko kaj kun tre mallonga kaj tre larĝa trunketo antaŭe. Dua tubero duoble pli larĝa ol la unua, multe plilarĝigata poste, kun forta elpreso aŭ eltranĉo post la mezo. Ventro ovoforma. La tuta korpo mallarĝa kaj maldika. Kruroj multete longaj kaj maldikaj.

Malbrila, delikatege sed profunde malglata aŭ reteta; ventro pli supraĵe reteta kaj iom malpli malbrila. Apudaj haroj longaj, flavaj, silkbrilaj, regule disjetitaj sur la tuta korpo. Sur la kapo ili laŭlarĝe kuŝas.

Bruna, kun ventro malpale bruna aŭ rustkolora, kun brunaj makuloj

sur la kapo kaj la brusto, sed ventro ĉiam brune malhela. Kruroj, antenoj kaj mandibloj malpur-flavaj.

Cienaga, kaj virgarbarego inter Dibulla kaj San Antonio en Kolombio (Sierra Nevada de Santa Marta), Ameriko de l'Sudo. Mi trovis neston (1896) inter ŝtonoj en la korto de domo (Cienaga). Unu ☿ izolata en la virgarbarego.

*Nova gentnomo.* Mi nomis (« *Ann. soc. ent. belg.* ») T. XLIX 1905, p. 171) *Wheeleria* novan gentnomon de Myrmicinoj. Sed, Prof. W. M. WHEELER skribis al mi ke, pli frue dum la sama jaro, TUTT nomis (« *Entomological Record* », 1895) *Wheeleria* novan genton de mikrolepidopteroj. Mi nun proponas la nomon **Wheeleriella** (nov. nom. = Wheeleria Forel, nec Tutt) por la parazita formikgento *Wheeleria* Forel'a.

La tie ĉi supre priskribo de la *Myrmicocrypta Emeryi* estas la unua priskribo de formikoj en lingvo internacia kaj necesigis la kreon de novaj teknikaj terminoj, difinitaj per iliaj franclingvaj tradukoj kiel sekvas:

Pedunklo = pédicule.
Tuberoj de l'pedunklo = Nœuds du pédicule.
Trunketo = pétiole.
Trunketo de l'unua tubero = pétiole du premier nœud.
Klipeo = epistome = (Lat.) clypeus.
Piedo aŭ tarso = tarse.
Fundsuprajo = face basale.
Deklivsuprajo = face déclive.
Eĝo = arête.
Anteneĝoj = arêtes frontales.
Antenvipo = funicule.
Skapo = scape.

☿ = laboristo
♀ = ino
♂ = viro
♃ = soldato
} poliformismo de formikoj.

D-ro Auguste FOREL,
*Yvorne (Svis.)*